

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 47-a BRAZILO, OKTOBRO | NOVEMBRO | DECEMBRO 2023 N-ro 192

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimumon kiel vin mem.”
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
Zamenhof. *La Espero*.

RETROSPEKTIVO LORENZ 2023

Eldonejo Lorenz, 48 jaroj de fekunda produktado por la bono kaj belo.




2023 ESTIS JARO DE GRAVAJ pri-pensadoj, multe da laboro kaj solidaj realigoj por la Bono, kun speciala reliefigo, post 48 jaroj, pri la akiro de la propra sidejo de Eldonejo Lorenz. Ni volas danki niajn geamikojn kiuj helpis efektiviĝi ĉi revon. Ankoraŭ multo restas por fari, sed kun la apogo de la geamikoj, ni marŝos sekure antaŭen. Elkoran dankon al ĉiuj!

portugala lingvo, en 5-a eldono, la verkon **Lumo de l' Espero**, de la Spirito Joanna de Ângelis, per la mediumeco de Divaldo P. Franco. Tamen, la speciala ĉi-jara atingo estis pri la libro **Kazo de Reenkarniĝo**, de la brazila mediumo Yvonne do Amaral


aperigis la naŭan eldonon en la portugala lingvo. Kiaj belaj novaĵoj!

Alia reliefiga fakto en 2023 estis la kuna, partnera laboro inter Eldonejo Lorenz kaj Brazila Spiritisma Federacio (FEB) por vendado de libroj: ne nur la libroj de Lorenz estas en la katalogo de FEB, sed ankaŭ la libroj de FEB estas en la katalogo de Lorenz.

Ni ankaŭ emfazas, ke por pliriĉigi nian katalogon, ni proponas al la esperantistaro plurajn aliajn produktojn: butonojn, flagetojn kaj, krom fizikaj libroj, ni jam havas pli ol 20 titolojn en la cifereca formato.



Koncerne la libroeldonadon, krom la tradicia **Almanako Lorenz**, kiu estas legata en pli ol 100 landoj, ni ankaŭ relanĉis, en la



Pereira, en la unua eldono, tradukita el la portugala de Affonso Soares. Koncerne la saman verkon, la aŭstralia samideano Trevor Steele tradukis en la ciferecan formaton al la angla rekte el la esperanta versio de Affonso. Por kompletigi la Trilogion de ĉi tiu nobla verko: angla, esperanta kaj portugala, nia Eldonejo





Aliaj gravaj faktoj estas la partoprenoj de Lorenz en la Brazila kaj Universala Kongresoj de Esperanto, kie ni lanĉis, en Italio, okaze de la Universala, **Almanakon Lorenz 2023**, partoprenis la Movadan Foiron kaj Paulo Sergio Viana prelegis pri Bazaj principoj de la Spiritisma Doktrino.

Okaze de la Brazila kaj Panamerika Kongreso de Esperanto, Eldonejo Lorenz lanĉis la belan verkon de Yvonne do Amaral Pereira, **Kazo de Reenkarniĝo**; Elmir dos Santos Lima prelegis pri Homaj rajtoj, homaranismo kaj Spiritismo kaj nia Eldonejo organizis belan budon. Alia



menciinda laboro estis la partopreno de Lorenz en la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto, organizita de UEA, kiam Affonso Soares virtuale prezentis la libron **Kazo de Reenkarniĝo** al niaj geamikoj el pluraj landoj.

Karaj gefratoj, ni atingis la finon de 2023 kun la konscio pri devo plenumita. Ni esperas, ke en la proksima jaro ni denove estos kune, ke ĉiu kunportos siajn briketojn por la konstruado de pli bona kaj justa mondo. Elkoran dankon, Feliĉan Kristnaskon kaj Fekundan Novjaron!

La Estraro
Eldonejo Lorenz



LA NATURO NUN KAJ ĈIAM

Antonio Félix da Silva

Pri la Naturo, nun mi kantas.
Ĉu ankaŭ vi kantos kun mi?
Se jes, dankon!
Se ne, kial ne?

Ĉiam bela la Naturo estas.
Ĝi donas al ni la florojn,
La birdetojn kaj la papiliojn.
Kiuĵ beligas ĉiujn ĝardenojn.



Kial ne ami la Naturon
Se ni kiel Estuloj vivas en ĝi?
Ĉar ni vivas kiel la floroj,
Kiel la lumo de la luno,
Kiel la ondoj de la maro,
Kiel la mildeco de la vento.

Ĉio, kio ekzistas en ni
Estas pro la amo de Dio.

ANIĜO POR 2024

Jam estas tempo por aniĝi aŭ reaniĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo, la ano ricevos nian jarlibron, *Almanako Lorenz*, la bultenon *Komunikoj*, rajton elekti du librojn el nia katalogo kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon kaj helpu nin daŭrigi nian laboron:

editora_lorenz@uol.com.br | (21) 98427-8080



| **KOMUNIKOJ** | Jaro 47-a
| n-ro 192 | Oktobro-Novembro-Dezembro | 2023
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ
Fondita la 15-an de Decembro 1975
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
☎ +55-21-98427-8080
Librovendejo: editoralorenz.com.br
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Fejsbuko: Editora Lorenz

| Kompostita de Rogério Mota |



AMARÍLIO HÉVIA DE CARVALHO (1933-2023)

A MARÍLIO naskiĝis la 1an de majo 1933 en Paraíba do Sul, Rio de Janeiro. Nuntempe li loĝis en Barra do Garças, ŝtato Mato Grosso.

Li partoprenis en dekoj da Esperantaj eventoj, vendante ĉemizojn je prezo de banano (laŭ lia diro).

Amarílio estis malnova esperantisto. Li aktivis ĉe Brazilia Klubo Esperanto en la 1950-aj jaroj, kaj estis dua sekretario de tiu Klubo dum la oficperiodo 1956/1957. En la 1970-aj jaroj li agadis ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Li instruis Esperanton en Niteroi ĉe la strato Leite Ribeiro n-ro 102, kaj en aliaj urboj, nome Rio de Janeiro, Valença kaj Barra Mansa, sub la aŭspicio de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

En la kvartalo Campo Grande, en la jaro 1960, li instruis nian lingvon kun apogo de KKE. Amarílio estis la unua prezidanto de Esperantista Junularo de Campo Grande, kreita en 1961. Tiu organizaĵo tre aktivis kaj organizis ekspoziciojn en lernejoj, kulturaj societoj kaj eĉ en "Palácio Pedro Ernesto", en tiu tempo sidejo de Ŝtata Konsilantaro de Rio de Janeiro. Laŭ la verko Historio de la Esperanta Movado en Brazilo, Amarílio Hévia de Carvalho estis sindonema ersono, idealisto

kaj disvastiginto de Esperanto en la okcidenta regiono, tre grava homo en la historio de Esperanto en tiu loko."

Li venkis en la oratora konkurso organizita de BEL, kiu okazis kadre da la 19a Brazila Kongreso de Esperanto (Rio de Janeiro, 1965).

En 1979 Amarílio estis intervjuita de la fama artisto Carlos Imperial dum programo de TV-Rio, kiam li respondis demandojn pri Esperanto.

Li plurfoje gvidis artan vesperon en brazilaj kongresoj de Esperanto. En la teatra kampo, li aktoris, reĝisoris, verkas kaj instruis. Ekzemple: kune kun Álvaro Bueno, Braz Consenza, Laura Alcântara, Sebastião Campelo, Jair Sales li rolis la teatraĵon "Conspiração Mineira" (Minasa Konspiro), verkita de Lima Cipollati originale en Esperanto. Tiu prezentaĵo okazis la 25an de oktobro 1982 en la Teatro Artur Azevedo, en la kvartalo Campo Grande, Rio de Janeiro.

Amarílio jam prezentis la monologon "Joaquim José – Fidoplena Martiro" ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en aliaj landoj. Temas pri la vivo de Tiradentes, kiu estas historia figuro de Brazilo.

Li prelegis pri "Interna Ideo", okaze de la Zamenhofa Festo en Rio de Janeiro, okazinta la 11an de decembro 1983.

Amarílio kaj Ciro Gomes de Freitas organizis la 48an Brazilan Kongreson de Esperanto, okazintan en Barra do Garças, Mato Grosso, en januaro 2013.

Amarílio, en Barra do Garças, estis konata kiel Sankta Nikolao, ĉar, en la fino de la jaroj, li surmetis vestaĵon de tiu Kristnaka figuro por distri ĉefe infanojn.

Li estis delegito kaj faka delegito (T-ĉemizoj) de UEA en Campo Grande-MT, kaj aliĝis al Komunisma Partio de Brazilo kaj kandidatiĝis al urba leĝfaranto, sed ne estis elektita.

Amarílio vojaĝis al Fortalezo por partopreni la 10an Tutamerikan Esperanto-Kongreson kaj la 57an Brazilan Kongreson de Esperanto, okazintajn de la 2a ĝis la 5a de novembro 2023. Bedaŭrinde, li mortis en hotelo, frumaltene, la 4an de novembro.

Ni esperas, ke ĉiuj soldatoj de nia armeo faros ĉion, kion Amarílio povis fari, por disvastigi Esperanton. Lia morto certe profunde frapis la koron de la brazilaj esperantistoj.

Artikolo pri Amarílio aperis en Brazila Esperantisto de marto 2012.

Eurípedes Barbosa

MEMMORTIGINTO



PANJO

Carlos Abreu

Panjo, verko de Dio,
Mi dankas vin,
Ke vivon vi donis al mi.

Batalema virino,
Virino sinforgesema.

Panjo, mi vidas en vi
La lumon, kiu transformis al mi la vivon.

Mi dankas vin, panjo plej kara.

Vi estas mia ekzemplo,
Vi estas mia vivo.

Panjo, vi estas la plej bela rozo,
Kiun Dio metis en mian vivon.

Panjo, mi amas vin, plej bela rozo,
Kiun Dio metis en mian vivon.

El la portugala lingvo tradukis: Affonso Soares



Kiam estis li infan' surtere,
Baldaŭ faris lin orfo la sorto;
Al fremduloj devis li servadi
Pro la vesto kaj pro l' seka pano.

Kreskis lia korpo, fortiĝadis,
Sed neniu zorgis pri l' animo;
Kiam viriĝante, li ekamis,
Trafis lin de l' mondo malestimo.

La knabin' amata lin ne amis,
Preferante maljunulon riĉan;
La junulo vivis tre malĝoje
Kaj malbenis sorton malfeliĉan.

Ne kredante je postmorta vivo,
Per armila paŭ' li sin mortigis;
Tre malfrue poste iu ekkonis
Ke li sin nur pli malfeliĉigis.

Tage, nokte en mallum', li sentis
La ĉeeston de kadavro sia,
Ĝian putrodoron kaj la vermojn,
Kaj penadis temp', sen helpo ia.

Li ne vidis la spiritojn bonajn,
Kiuj pri li zorgis kun atento,
Atendante, ke en lia menso
Nasku lumo de savanta pento.

Iutage lia konscienco
Ekvekiĝis, kaj li petis Dion
Pri pardono, kaj patrino lia
Venis, portante la savmision.

Li pli poste al la ter' revenos,
Kie vizitados lin doloroj,
Sed ke li eltenu, al li helpos
De la konscienc' la rememoroj.

Reformador, Nov 1946, p. 268
Spirito: Abel Gomes
Medumo: F. V. Lorenz
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto



Kristnasko – la donaco
De vi mi volas ricevi
Donacon ja tre valoran,
Dediĉitan el la koro,
lun regalon tre belan,
Frukton de ama bonvolo,
De frat-al-frat´ kun fervoro.

Jes, karul´, kedu al mi,
Necesas al vi donaci
El via temp´ iometon,
El via anim´ kareson,
Al vojirantaj tristuloj,
Tiel solaj en la mondo,
Ke preĝon ili forgesas.

Ni havas la vivogracon,
La fidon al la Sinjoro.
Do kun milda maniero
Ni disdonu la esperon
En formo de ama koro.

Tiel restas prilumata
Unu plia laborjaro
En malgranda ĝojplantejo,
Kiu senĉese kreskadadas.
Tial idoj de bonvolo,
En la nom´ de l´ karitato,
Unuiĝe laboradu.



Spirito: Memei
Mediumo: Geralcino Gomes
Libro: Iu revo... ĉiutaga Kristnasko.
Eldono: Eldonejo Lorenz
El la portugala tradukis: Affonso Soares



La akvo, la Kristo

PROFUNDE EN ARBARETO ESTIS FONTO, unu el tiuj etaj sed konstantaj. Ĝi estis rimarkata kaj uzata de originaj popoloj por diversaj celoj, inkluzive por rikolti apudan kotan teron kiu pli rapide fariĝis fekunda pro la putriĝado de organika materialo.

La konstanta fonteto, poste, fariĝis kamparana krano kie la akvo estis ofertata kaj kolektata per siteloj, kaseroloj, kalabaso kaj vazoj por vojaĝo aŭ kuirado.

La arbaro iĝis nuda kampo. El ŝtonoj fontis senĉese la altvalora likvo. Ifoje ĝi forte fluadis pro la pluvoj sur la montoj, aliffoje ĝi maldikiĝis pro la sekeco.

Sed ĉiam faladis la diamantaj gutoj.

Tuj poste de la arbaro foriris la arboj. El la erikejo fariĝis placo kaj la ĉirkaŭaĵoj el domoj kaj stratoj modlis la urban horizonton .

La natura fonto tie restis, ŝprucante simple, sed konstante.

* * *

Tra la jarcentoj niaj vivoj transformiĝas. Enkarniĝo post enkarniĝo, ni vidas la oftan ŝanĝigon de kutimoj, modoj, vestaĵoj, scenejoj, kuklturo, devoj kaj leĝoj.

Ĉio pasas ĉe la senĉesa fluo de la tempo.

Ĉio venas kaj ĉio iras laŭ la Leĝo de Kreado kaj Detruado.

Ĉio, ja ĉio ŝanĝiĝas, transformiĝas.

Ĉio ekaperas, difektiĝas kaj malaperas, por denove ekaperi modifita kaj denove malaperi.

La sola, kio ne ŝanĝiĝas, estas la akvo ĉe konstanta sprucado.

La sola, kio ne ŝanĝiĝas, estas la mesaĝo de la Kristo, eterne disponebla al niaj konsciencoj.

Ŝanĝiĝas eĉ la maniero kiel ni uzas akvon.

Ŝanĝiĝas eĉ la maniero kiel ni uzas la lecionojn de la Majstro, laŭ nia kompren-kapablo.

Ĉio ŝanĝiĝas, ĉio pasas.

Nur la Kristo estas eterna.


Dank´al Dio.

Spirito: Antônio Franciso
Mediumo: João
Tradukis el la portugala: João

ALMANAKO LORENZ 2024

KARAJ VERKISTOJ DE ALMANAKO LORENZ, kiuj ankoraŭ ne liveris sian tekston por **Almanako 2024**, jam estas tempo, ĉar la limdato estas 31/12. Ni al vi rememorigas, ke la jarlibro Lorenz estas legata en pli ol 100 jaroj kaj verkistoj el la plej diversaj landoj partoprenas. Via teksto estas bonvena: prozo, poemo, romano, informoj... Partoprenu! Via teksto estas ja bonvena!

KOMUNIKOJ N-ro 192






Al societo "Espero"
18. (30.) VI. 1891 (o.v. V-136)

Kun ĝojo mi legis la sciigon, ke vi fondis rondeton por labori por nia afero kun fortoj unuigitaj. Akceptu mian koran gratulon kaj la deziron de la plej bona kaj brilanta sukceso. La societo "Espero" kresku kaj floru kaj alportu eternan benon al nia afero. Ni esperu, ke la rondeto okupos baldaŭ tre gravan lokon inter niaj laborantoj kaj ellaboros al si eternan neforgeseblan nomon en la historio de nia afero; ni esperu ke via energia rondeto baldaŭ fariĝos la patro por multaj aliaj rondetoj en diversaj urboj de nia lando kaj de aliaj landoj. El la koraj kaj fajraj vortoj de via letero mi vidas, ke vi konscias la tutan malfacilecon de nia afero en la nuna tempo kaj la tutan paciencon, je kiu vi necese devos esti armitaj, se vi

volas sukcese labori kontraŭ la indiferenteco de la amasoj. Sub la malsukcesoj de la unua tempo ne perdu la kuraĝon kaj energion kaj ĉiam memoru, ke per konstanteco ni pli aŭ malpli frue venkos. Longe staras la vintra glacio kaj ŝajnas, ke la tuta laboro de la sunaj radioj ne povas venki eĉ unu peceton de la glacio; sed la tempo venas kaj la konstanteco venkas, kaj post la unua disrompo rapide fluidiĝas la tuta glacio. Via letero estos presita en la N° 7 de la "Esperantisto". Mi esperas, karaj amikoj, ke vi ofte kaj regule ĝojigados min per viaj leteroj kun sciigoj pri via laborado. Plej koran saluton al ĉiuj membroj de via societo sendas al vi via aldonita.

L. Zamenhof

El la libro: **Unua etapo de Esperanto.**
1878-1895
Eldonejo Ludovikito



NOVA SIDEJO

La unua etapo de la konstruado de la nova sidejo de Lorenz estas preskaŭ preta, dank' al la kunlaboro de pluraj samideanoj, kiujn ni tutkore dankas! Se Dio volos, ni komencos la duan etapon en la proksima jaro. Por tio, karaj gefratoj, ni denove bezonos la kunlaboron de ĉiuj bonvolemaj homoj, ĉiuj kunportantaj siajn briketojn por la konstruado de la definitiva sidejo de nia Eldonejo. Se vi volos kunlabori, skribu al ni:

 editora_lorenz@uol.com.br

 **(21) 98427-8080.** Elkoran dankon!

 **Pix: 42.515.452/0001-56 (CNPJ)**



NI INTERĜANGU KULTURON PER LIBROJ!

VI, KIU ŜATAS LEGI, koni aliajn kulturojn, filozofiojn... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Estos granda plezuro ricevi verkojn el diversaj landoj kaj ilin diskonigi inter niaj membroj!





Universala Esperanto-Asocio



Aruŝo alproksimiĝas!

La 109-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazos inter 3-a – 10-a de aŭgusto 2024 en Aruŝo, Tanzanio.

La Kongresa Fako de UEA kaj la Loka Kongresa Komitato jam multe laboras pri la evento kaj pretigas neforgeseblan sperton por ĉiuj partoprenantoj de la aranĝo.


Ne maltrafu la plej favoran aliĝperiodon! Aliĝu ĝis la 31-a de decembro 2023 ĉe <https://uk.esperanto.net/2024/>

Ni atendas vin en Aruŝo!



AGORA VOCÊ PODE ADQUIRIR EM NOSSA LOJA
VÁRIOS TÍTULOS DA FEB E DE OUTRAS EDITORAS

www.
editora
lorenz
.com.br



FAÇA-NOS UMA VISITA!

LORENZ

KOMUNIKOJ N-ro I92



ZAMENHOF KAJ “NACIONALISMO”

Trevor Steele

MIESPERAS, ke la aktuala buĉado en Israelo kaj Gaza ĉesos, antaŭ ol oni presos tiun ĉi artikolon. Sed dum la pasintaj semajnoj palestinanoj (Hamas kaj aliaj grupoj) murdis pli ol mil homojn pro tio, ke ili estas judoj. Reage, la israela armeo buĉas multajn milojn da homoj pro tio, ke ili estas arabparolaj palestinanoj.

Kiel ni nomu tiun abomenindan pensmanieron, tiun instinkton murdi aliajn, ĉar ili ne apartenas al nia grupo? Tribismo? Ksenofobio? Nia antaŭulo Zamenhof parolis pri “nacionalismo”, kiun ni nun nomas “naciismo”.

Ludoviko estis judo en tempo, kiam judoj estis ĉie viktimoj de persekutado, speciale en la Rusa Imperio, kie li vivis. Diskriminacio, falsaj akuzoj, pogromoj, jen la sorto de tiutempaj judoj. Por sin protekti multaj judoj aliĝis al la movado nomata cionismo, kies celo estis starigi judan ŝtaton. Cion estas monto apud Jerusalemo, por judoj simbolo de la iama juda ŝtato detruita de la granda potenco de tiu tempo, la Romia Imperio.

En siaj komencaj jaroj cionismo estis baze sindefenda movado, kaj Zamenhof, kiel gentokonscia judo, aliĝis al ĝi. Li eĉ konstruis gramatikon de la jida lingvo, kiun li supozis la venonta lingvo de juda ŝtato. Li persone preferis, ke tutmondaj judoj aĉetu teritorion apud la rivero Misisipo kaj tie fondu sian ŝtaton, sed ĉar granda plimulto de cionistoj volis atingi tion en la regiono ĉirkaŭ Jerusalemo, Zamenhof lojale subtenis tiun celon.

Sed iom post iom li sin distancigis de ĉiu formo de “nacionalismo”, inkluzive cionismon. Li skribis:

Laŭ miaj konvinkoj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel nature sindefenda reago – estas multe pli pardoninda ol la nacionalismo de gentoj premantaj, sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta: mi volas labori nur por interhoma justeco absoluta.

Poste li venis al alia bedaŭrinde vera konkludo, nome, ke ĉiu ajn “nacionalismo”, eĉ tiu de relative malgranda grupo, povus, se la situacio ŝanĝiĝus, iĝi “premana”.

Ĉu tio ne klare skizas la situacion en Israelo/ Palestino hodiaŭ?

Ni esperantistoj devas simili al la kreinto de nia movado kaj celi harmonian homaron. Ni rajtas fieri, ke nia lingva patro estis profeto de nova mondo, en kiu universala lingvo estos nur unu elemento de tiu harmonio. Kaj ni venku en la propra koro ĉian limigan “nacionalismon”.

SENSACOJ

KIEL PLEZURE FLARSENTI odoron jam de longe perditan!

Mi diras odoron, ĉar mi ne volas ĉirkaŭlimigi la senton per nura percepto de nutraĵa aromo aŭ de florphumo.

Nuntempe mi sentas min rekompencita, ke al mi eblis senti la odoron de brulligna fornelo... Tio sendas min al tiu tempo, kiam mi, senzorga, sentis ke la varmo de la flamo lulas mian komforton, la varmota aero min tuta brakumas, kio al mi donas la senton pri sekureco kaj protekto.

Iafoje tiaj odoroj, sensacoj, pasemaj imagoj ligiĝas kun niaj memoroj pri tiuj pasintaj sentoj.

Kaj kiam ni denove sentas la protekton kaj la varmon, eble naskitajn de la ĉeesto aŭ helpo de amika kaj bonfaranta spirito, tiam la ligiĝo estas tuja.

La memoro eble estas provokita kaj ĝia elvoko transigas al ni la senton kaj staton de favora akceptemo.

Kiam ni do spertos senton pri favora memoro, ian senton protektan aŭ tre agrablan pri la pasinteco, ni lasu nin esti portata de tiuj sentoj. Ni provu esplori la internon de la spirito celante tie trovi tiun bonfaran senton.

Ni penu ligi tiajn sentojn al la altaj spiritaj sferoj kaj kultivi en ni ĉian memoron al ni agrablan. Ni malfermu la menson kaj alprenu ajnan ideon fontantan el la "nenio".

Tiu "nenio" estas kvazaŭ malfermita kanalo el la spirita regiono, kiu nin atentigas, admonas aŭ al ni balzamas la



vundojn per pensoformoj, kiuj en profunda sintezo transigos al ni la profundan amon de nia Kreinto al la tuta homaro.

Ni kultivu bonajn pensojn.

Nia menso estu malfermita al la torentoj da benoj, kiuj ŝprucas el la neelĉerpebla dia fonto. Ĉi fonto, reflektita en niaj perceptoj per plej agrablaj aspektoj, ĉerpitaj el nia profunda memoro, atingas nin sub formoj de trankvileco, kareso, akceptemo kaj sekureco.

Ni malfermu al ni la mensojn kaj vivu ĉiam pli kaj pli ligitaj, agorditaj al la eternaj fontoj de bonstato.

Feliĉo estas, pli ol iam ajn, atingebla por ni ĉiuj.

Ĉiam pli kaj pli, kun kreskanta rapideco, proksimiĝas la atingo de la tiel nomata feliĉo. Ja pli proksima, sed ni ankoraŭ ne ĝin atingis.

Gravas al ni klopodi por atingi la staton de akceptemo.

Ni serĉu akiri la kondiĉojn por akcepti la torentojn favorajn al la feliĉo. De preskaŭ malofte ĝis iafoje, kaj, per la graco de Dio kaj pro nia penado, de iafoje ĝis kutime.

Ni iradu en la ĉielaj regionoj detempe de la surtera irado. Ni ligiĝu al tiuj sentoj kaj vojoj, kiuj al ni havigos definitivan direkton en la ascenda vojo.

Ni estu kuraĝaj por lasi nin ĝui tiujn feliĉajn poziciojn, tiun staron favoran al irado sur luma vojo.

Dank'al Dio.

Spirito: Antônio Francisco

Mediumo: João

El la portugala tradukis: Affonso Soares

KIE ESTAS VIA TREZORO?

Ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro. ("La Evangelio laŭ Spiritismo", ĉapitro 25, paragrafo 6)

La aferoj havas la valoron, kiun ni donas al ili nek pli, nek malpli. Kio estas multekosta al iuj, tio nenio signifas al aliaj.

Kiam ni komprenos tiun veraĵon, tiam ni ĉesas devigi la aliajn valorigi tion, kio al ni estas senvalora.

Tiel ni ankaŭ lernas respekti la valoron, kiun iaj aferoj havas, laŭ la opinio de aliaj personoj.

Ne kreu neproduktemajn diskutojn, por klopodi konvinkigi iun ajn pri la valoro, kiun via trezoro havas.

Ni ĉiuj havas gustojn, variajn kapablojn, sensaĵojn. Ĉiu el ni tamen devas zorgi pri tio, kio estas grava por li.

Kiam vi trovos iun, kiu valorigas ion, kio nenion valoras por vi, sciu kompreni lin. Kiam oni ne komprenos vin laŭ tio, kion vi valorigas, lernu teni viajn serenecon kaj konfidon.

El la libro "Transformantaj Ideoj"

Spirito: Matheus

Mediumo: Cleber Galhardo

Tradukis el la portugala: Benedicto Silva



ELDONEJO LORENZ EN LA TUTMONDA ĈEFURBO DE LA LIBRO (RIO 2025)

La urbo Rio-de-Ĵaneiro estis elektita de Unesko por esti la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro por la jaro 2025.

La nomumo estis farita de la Ĝenerala Direktorino de Unesko, Audrey Azoulay, la pasintan 4-an de oktobro.

Dum la 12 monatoj, ekde la 23-a de aprilo 2025 – dato en kiu oni festas la Tutmondan Tagon de la Libro – Rio-de-Ĵaneiro ricevos programon kun aktivaĵoj dediĉitaj al la disvastigo de la libro kaj legado.

La jam tre konata Libro-Foiro Bienalo de 2025 estos certe unu el la plej atendataj eventoj de tiu programo.

Tiu honora titolo de Unesko estas transdonita ekde 2001. Nuntempe, Akro, la ĉefurbo de Ganao, posedas tiun titolon. Por la jaro 2024 estos la vico de la urbo Strasburgo en Francio.

Eldonejo Lorenz, kiu havas sian sidejon en Rio-de-Ĵaneiro, kun granda honoro celebros tiun belegan feston.

Álvaro Motta

